# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (963) • 2023 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



La naskiĝo de Kristo

El Greco, 1541–1614

Grek-hispana artisto

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 philippe.cousson@sfr.fr

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. 💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## Enhavo


| | |
|---|---|
| La paŝtisto konas siajn ŝafojn | 123 |
| Dek helpoj – pri la dekalogo | 127 |
| Solenaĵo en Poděbrady | 132 |
| La Sankta Akvo | 137 |
| Nia sekvontjara kongresurbeto: Vác | 140 |
| Informetoj | 122 |
| Kotiztabelo | 123 |
| Kanto: Laŭdon – Laudato si | 124 |


## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, hodiaŭ kiam mi skribas tiujn ĉi liniojn, komenciĝas la nova eklezia jaro — la unua advento! Tio ankaŭ signifas ke komenciĝas tempo de ĝojo, tempo de atendado, tempo de espero. Kaj konkrete ni lumigas kandelojn. Baldaŭ ni celebros S:ta Lucian — denove lumo en la malhelo. Uzu la tempon saĝe kaj ĝi donu al ni novan energion kaj forton.

Ni vere kaptu la eblecojn forigi la mallumon, el nia ĉirkaŭo proksima kaj malproksima, kaj ni dissendu lumon.

Inter alie mi pensas pri tiuj, kiuj ne povas trankvile kaj kun ĝojo prepari la kristnaskajn festotagojn kaj eble ne povas esti inter familanoj. Per la vortoj de Jelly Koopmans mi preĝas ke ni ĉiuj povas esti lumo al nia proksimulo.

*Ho Patro, donu al mi la emon por tute dediĉi min al mia proksimulo, se tiu bezonas min. Amaj pensoj ĉirkaŭu la alian, kaj mi disdonu amon, amikecon, trankvilecon kaj fidelecon. Provizu min.*

(Preĝo por ĉiu Tago 2/12)

# “La paŝtisto konas siajn ŝafojn”

## Prediko dum la germana esperanto kongreso, majo 2023

Roland Schmidt, DE

2.1 Kiam fariĝis Pentekosto, ĉiuj estis kune je unu loko. 2 Subite el la ĉielo estiĝis bruego kvazaŭ ekblovus forta vento, kaj tio plenigis la tutan domon, kie ili estis. 3 Aperis al ili fajraj langoj, kiuj disiĝis kaj eksidis sur ĉiun el ili. 4 Ili ĉiuj pleniĝis je sankta spirito, kaj komencis paroli en fremdaj lingvoj, laŭ tio kion al ili la spirito donis por eldiri. 5 En Jerusalem loĝis piaj Judoj, devenaj el ĉiu popolo sub la ĉielo. 6 Kiam ekestis tiu sono, la amaso kunvenis, kaj ili konfuziĝis, ĉar ĉiu unuope aŭdis ilin paroli en sia propra dialekto. 7 Mirigite ili sin demandis: Ĉu ne ĉiuj, kiuj tie parolas, estas Galileanoj? 8 Kiel do eblas, ke ni ĉiuj aŭdas <ilin> paroli en la propra dialekto, en kiu ni naskiĝis? 9 Partoj, Medoj kaj Elamanoj, loĝantoj de Mezopotamio, Judajo kaj Kapadokio, de Ponto kaj Azio, 10 de Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la Libia regiono apud Cireno, kaj ĉi tie loĝantaj Romianoj, 11 Judoj kaj prozelitoj, Kretanoj kaj Araboj: ni ĉiuj aŭdas ilin *paroli* en niaj lingvoj *la grandajn farojn de Dio*. 12 Ĉiuj miregis, kaj en granda necerteco unu diris al la alia: Kion ĉi tio signifas? 13 Sed aliaj moke reagis: Ili plenas je mosto!

Agoj 2:1 Laŭ traduko de Gerrit Berveling

Karaj esperantistoj, estis fortaj potencoj naturaj, kiuj alvenis ĉe la disĉiploj: ventego, aŭ almenaŭ la sono de ventego, kaj fajro. Oni povas timi pri tio. Ventego kaj fajro estas danĝeraj, kaj la du kune estas danĝeregaj. Ĉi tie, fajrego kaj ventego detruis la malnovan Brunsvigon en Oktobro 1944. La fajrobrigado sukcesis savi multajn milojn da urbanoj, sed estingi la fajregon estis neebla.

Aliflanke, la vento kaj la fajro ne tro grandaj estas tre utilaj. Vento ŝanĝas la veteron, ĝi movas velŝipojn kaj ventmuelilojn. Fajroj varmigas nin dum vintro.

Sed la ideo ke fajro kaj vento estas la sankta spirito estas iel fremda por ni. En nia kulturo, la potencoj de la naturo kaj la aferoj spiritualaj estas apartaj. Do, plejofte, la sankta spirito estas pentrata kiel simbolo: kolombo subflugante tenere kaj mallaŭte de la ĉielo. Ĝi estas sendanĝera kaj simbolo de paco.

Sed por la antikvaj homoj, la naturo kaj la aferoj spiritualaj estis konektitaj, eĉ en iliaj lingvoj! Ankaŭ en Esperanto ni havas similecon de la vortoj “spirito” kaj “spiro”. En la germana, oni diras “mi povas spiri” se oni havas almenaŭ iom de tempo kaj libereco por ripozi kaj pripensi. La spiro estas signo de la vivo: Se iu svenas sed spiras, ni scias ke tiu persono ankoraŭ vivas. Kompreneble, la spiro de homoj kaj bestoj estas sendanĝera kaj ofte mallaŭta, kiel kolombo... sed la spiro de Dio... kiu scias? Ni pensos pri la sankta spirito kaj la spiro, do la vivo de ni, de la naturo, kaj de Dio.

Do, kio okazis dum pentekosto? Antaŭe, la disĉiploj estis kaj restis kune, sed havis malmultajn kontaktojn kun aliaj homoj. Ili timis, ŝokitaj de la kruela ekzekuto de Jesuo. Ili timis ankaŭ post kiam ili vidis Jesuon releviĝintan. Timo ofte malvigligas nin.

Sed dum pentekosto, la Sankta Spirito totale ŝanĝis la situacion.

Subite, la disĉiploj havis kuraĝon paroli publike. Petro eĉ predikis spontane pri la vivo, la morto kaj la releviĝo de Jesuo Kristo, lia sinjoro. Mi pensas ke la disĉiploj subite spertis grandan ĝojon. La ĝojo forpelis la timon kaj vigligis la disĉiplojn.



Pentekosto, El Greco ĉ 1600

Cetere, la Sankta Spirito gvidis la disĉiplojn. Luko, skribinte "La agoj de la apostoloj" montris multajn situaciojn en kiuj la disĉiploj spertis helpon por iliaj decidoj kaj vortoj. Paŭlo skribis: Ĉiuj, kiuj estas kondukataj de la Spirito de Dio, estas filoj de Dio. Laŭ liaj leteroj, estas grave por kristanoj esti gvidataj de la Sankta Spirito.

Tiu memorigas min al Jesuo Kristo, kiu diris ke li estas bona paŝtisto. Li gvidas nin kiel paŝtisto gvidas siajn ŝafojn. Ni bone konas la psalmon 23: "*La Eternulo estas mia paŝtisto; mi mankon ne havos. Sur verdaj herbejoj li ripozigas min. Apud trankvilaj akvoj li kondukas min.*"

La paŝtisto konas siajn ŝafojn kaj scias pri iliaj bezonoj. Tiel, Dio konas nin, scias pri niaj bezonoj, gvidas nin kaj helpas nin kontentiĝi. La ŝafoj konas la voĉon de la pastiŝto. Ĉu ni konas tiel la voĉon de Jesuo?

Por multaj kristanoj mankas kvieto por aŭskulti tiun ofte mallaŭtan voĉon. Preĝi bezonas kvietan animon, sed niaj animoj ofte estas malkvietaj kiam ni havas zorgojn, kverelojn – aŭ nur tro da mesaĝoj en niaj poŝtelefonoj.

Sed – ĉu ni cetere povas kompreni tiun psalmon alie, preskaŭ laŭvorte? Ni ne bezonas herbojn por manĝi kaj havas diversajn trinkaĵojn, sed – ĉu ni tamen bezonas verdajn herbejojn por ripozi? – kaj la akvon de riveretoj por ĝojigi kaj vigligi nin? La sekvonta frazo de la psalmo estas "Li kvietigas mian animon".

La germana traduko uzas la vorton "erquicken", kiu signifas kaj "vigligi" kaj "ĝojigi". Ĉu la naturo helpas nin kvietigi niajn animojn, por pli bone aŭskulti al

Dio? Ĉu ĝi vigligas kaj ĝojigas nin por gvidi nin al laŭdado de Dio?

Mi pensas ke jes. Jen kelkaj kristanoj kiuj havis profundan kaj gravan rilaton kun la naturo.

*Paul Gerhard* naskiĝis en la jaro 1618. En tiu jaro, la milito de tridek jaroj komenciĝis en Germanujo. La vivo de Paul Gerhard, pastoro kaj poeto, ofte estis trista, ĉar homoj, kiuj havis rilaton kun li, mortis frue: lia patrino, edzino, kaj aliaj. Do li ofte ege bezonis ĝojon en sia vivo – kaj ni kantis lian bonegan konsilon. Laŭvorte, la teksto germana de la unua strofo estas: Eliru, mia koro, kaj serĉu ĝojon en tiu kara somertempo pri la donacoj de via Dio. Rigardu la belajn ĝardenojn kaj vidu kiel ili ornamis sin por mi kaj vi. Sekvas 14 aliaj strofoj. Tiu poemo estas inter la plej belaj poemoj pri la naturo kiuj ekzistas en la germana lingvo. Eĉ post preskaŭ 400 jaroj, multaj homoj amas tiun kanton plu. Paul Gerhard havis multan sperton kun malĝojo kaj li lernis, ke ofte oni devas serĉi la ĝojon: Eliru, pasigu tempon en la naturo!

*Joachim Neander* naskiĝis en la jaro 1650 en Bremen. En la aĝo de 24 jaroj, li iĝis lernejestro kaj pastoro en Düsseldorf. Tie, li tre amis iri en la belegan rokvalon de la rivereto Düssel, ĉirkaŭ 15 km oriente de Düsseldorf. Tie, li verkis poemojn kaj kantojn pri Dio kaj la naturo.

En tiu tempo, ne estis libereco de la kredo en Germanujo. La pastoroj ne rajtis paroli pri kelkaj temoj en la preĝejoj. Sed okazis kunvenoj kun Neander en tiu valo por paroli pri tiuj temoj.

Neander devis foriri al Bremen post nur kvin jaroj en Düsseldorf. Bedaŭrinde, li mortis dum la sekva jaro. Kvankam li ne vivis longe en Düsseldorf, la popolaro de la regiono neniam forgesis tiun pastoron kaj poeton, kaj post cent kvindek jaroj, oni nomis la valon laŭ Neander, en la germana tio estas "Neandertal".

Bedaŭrinde, la industrio ĉe la Ruhr bezonis kalkon. Do en 1854, la Neandertal iĝis ŝtonrompejo. Jam 1856, en kavo kaŝita inter la rokoj, laboristoj trovis tre malnovajn ostojn de homoj malsamaj de ni. Oni nomis tiujn homojn "Neandertaluloj".

La ŝtonrompejo funkciis dum preskaŭ cent jaroj, kaj forprenis ĉiujn rokojn, amitajn de Neander kaj multaj aliaj homoj, verŝajne ankaŭ kelkaj Neandertaluloj. Nun la Neandervalo estas naturrezervejo inter Düsseldorf kaj Wuppertal, kun arbaroj sur ambaŭ flankoj, kaj muzeo pri la neandertaluloj.

*Francisko* naskiĝis antaŭ 840 jaroj en Asizo, Italio. Filo de riĉa familio. Kiam li estis 18-jara, li partoprenis en milito kontraŭ alia itala urbo. La kontraŭuloj venkis, kaj kaptis Franciskon. Li estis militkaptito kaj ostaĝo dum longaj 15 monatoj, ĝis liaj gepatroj pagis elaĉetan monon. Eble lia situacio dum kaptito ne estis malbonega, ĉar la malamikaj urbanoj ne volis lian morton sed la elaĉetan monon – sed certe tio estis grava sperto kun malliberecο.

Poste, Francisko ofte vivis sola en la naturo, finfine forlasis siajn gepatrojn kaj sian vivon kiel riĉulo de Asizo, kaj iĝis monaĥo. Lia familio ne apogis tiun decidon. Li trovis aliajn virojn, kiuj volis vivi kun li – malriĉe laŭ ilia volo, en simplaj vestaĵoj, kaj nudpiede kiam eble,

do preskaŭ ĉiam. Ili helpis malsanulojn kaj riparis preĝejetojn. De tiu grupo kreskis la monaĥa ordeno de la Franciskanoj.

Francisko skribis la plej malnovan tekston, kiu ekzistas en itala lingvo. Antaŭe, oni nur skribis latine. Tiu teksto estas poemo kaj preĝo kiu laŭdas dion por la senviva naturo – por frato suno, fratino luno, frato vento, fratino akvo, frato fajro, eĉ patrino tero kaj fratino morto. Ĉu frato aŭ fratino – tio ne estas kompleksa teologio, tio estas gramatiko itala. En la itala lingvo, la substantivoj estas viraj aŭ inaj. La virajn substantivojn li nomis "frato" kaj la inajn "fratino".

Laŭdi dion por la fratino morto estas iel logika – kiel la suno, la morto estas parto de la naturo kaj ebligas la vivon. Sen la morto, kun la neandertaluloj kaj ĉiuj kiuj naskiĝis depost, la tero estus tro plena da homoj. Sed laŭdi Dion por nia morto estas fremda por ni.

Mi jam diris – li iris nudpiede, por rifuzi la vivon kiel riĉulo. Do li sentis la teron multe pli ol tiuj, kiuj portis ŝuojn. Li ĉiam spertis terajn temperaturon kaj humidecon, kaj multon pli. Eble tial li nomis la teron sia patrino.

Multaj kantoj estis verkitaj laŭ tiu poemo. En Germanujo, ni bone konas la kanton "Laudato si" kun refreno en la originala malnova itala lingvo de Francisko – kaj naŭ strofoj germanaj, farite laŭ tiu poemo. Ili nur aludas al la fratino morto. La junuloj multe amas tiun kanton ekde 50 jaroj, do la unuaj junuloj kiuj kantis "Laudato si" nun eble estas geavoj.

Ni havas tiun kanton esperante! La Germanoj certe konas la melodion. Albrecht Kronenberg verkis tekston esperantan laŭ la poemo de Francisko por tiu melodio (vidu dorsan paĝon ĉi-numere).

*La Eternulo vin benu kaj vin gardu. La Eternulo lumu al vi per Sia vizaĝo kaj favorkoru vin. La Eternulo turnu Sian vizaĝon al vi kaj donu al vi pacon.*

---

**Ĝojplenan kristnaskan feston**
**& Sukcesan novan jaron**

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ &
Bengt Olof ÅRADSSON

# Dek helpoj — pri la Dekalogo

## Sepa ordono — Ne adultu (Eliro 20,14)

József FARKAS, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Estas mia konvinko, ke en ĉi tiuj dek versikloj Dio ne volis bati nin, ne volis doni striktajn ordonojn, malmolajn regulojn al ni, sed Li volis doni helpon al ni, ke homo fariĝu homo. Laŭ mia Dio-kono Li amas nin. Dio volas, ke ni fariĝu homo, parolas al ni, parolas kun ni, Li donas helpon, admonojn, montras direkton. Unu ĉapitro de tiu ĉi helpa amo estas, ke Li donis al ni tiujn ĉi dek ordonojn, dek helpojn. Li malkovras la regulojn de la homa vivo, montras la gravajn punktojn, la tentojn, la batalojn kiujn ni devas batali, kaj tiel, en amo li kondukas, direktas nin al la pli plena homa vivo.

La dek ordonoj estis ĉizitaj sur du ŝtonajn tabulojn. Tiel ni kutimas instrui tion al la infanoj, ke sur la unuan tabulon Dio skribis tiujn ordonojn, helpojn, kiuj rilatas pri la komunumo kun Li. Ili estas la unuaj kvar ordonoj. Sur la alian tabulon Dio skribis ses ordonojn, en kiuj Li difinas nian rilaton kun la aliaj homoj. Kaj en tiu ĉi instruo jam troviĝas tiu grava vereco: nur tiam eblas vivi plenan homan vivon, se ni havas ordigitan rilaton kun Dio, kaj ordigitajn rilatojn kun la aliaj homoj. En alianco kun Dio kaj en bona rilato kun homoj. Tion signifas la plena homa vivo.

Do ni nun estas je la dua ŝton-tabulo, sur ĝi je la tria ordono: *Ne adultu!* Pri tiu ĉi ordono ni meditu nun.

Mia baza vidpunkto estas pri tiu ĉi ordono, ke mi ne skoldas la pekulojn. Tiu ĉi ordono donas bonan eblecon al multaj predikantoj, ke ili skoldu la tutan mondon. Adulta junularo, faliĝanta moralo, statistiko de divorcoj, mortigo de infanoj, kaj tiel plu. Do kio estas mia baza vidpunkto? Mi certas, ke la seksa instinkto, instinkta forto estas donaco de Dio, kiun ni ricevis vere kiel donaco, por ke nia vivo estu pli riĉa, pli ĝoja. Pro tio Dio donis ĝin al ni, ke nia vivo estu pli homa per tio. Ne *nur* pro tio donis al ni Dio, ke ni havu infanojn — inter multaj miskomprenoj troviĝas unu en tiu ĉi temo. *Ankaŭ* pro infanoj donis Dio, sed ankaŭ pro tio, ke la geedzoj estu unu kun la alia en tiel intima, en tiel bela, en tiel riĉa rilato, kian rilaton ni alie ne eblus imagi kaj atingi. Ni ricevis la seksan vivon kiel donacon, Dio donis ĝin por riĉeco, ĝojo, plena vivo, burĝona homeco.

> ***… nur tiam eblas vivi plenan homan vivon, se ni havas ordigitan rilaton kun Dio, kaj ordigitajn rilatojn kun la aliaj homoj.***

Sed bedaŭrinde en la homaj manoj malboniĝas la donacoj de Dio. Ankaŭ ĉi tiu donaco malboniĝis.

Sed nun venas la malfacile akceptebla vereco: Ne tiel estas, ke tiu ĉi donaco malboniĝis en la sekulara mondo, sed dank'al Dio ne malboniĝis en la mano de la eklezio. Interne ni vivas sanktan kaj puran vivon, la kulpantoj estas ekstere. Mia longa anim-prizorga laboro konvinkas min, ke kaj interne oni malbone pensadas kaj ekstere oni malbone pensadas. Interne, en la eklezia mondo oni alimaniere pensadas malbone, sed estas la devo de la eklezio, ke unue superrigardu sian propran malbonan pensmanieron, kaj nur poste skoldu la eksteran mondon — se la eklezio havos tempon kaj kialon fari tion post la superrigardo.

Kiel malboniĝas la afero ekstere, kaj kiel malboniĝas la afero, la donaco de Dio en la mano de la kredantaj, religiaj homoj?

"Ekstere" tio estas la problemo, ke oni diigas, apoteozas sekson kaj tiel demonigas ĝin. Tio estas la dia, la savanta, la unu nura celo kaj ĝojo de la vivo. Ekstere oni diigas sekson en filmoj, en literaturo kaj tiel donas demonan forton al sekso.

"Interne" oni timas pri la sekso kaj tiel demonigas ĝin. Ĉar ankaŭ per timo eblas demonigi ion. Interne oni diras, ke la sekso estas io kulpa, io terura, ni fermu ĝin eksteren kaj plej bone ne paroli pri ĝi, ni hontu pri ĝi. Per tiu ĉi agado ni same demonigas sekson.

La plej ŝokan frazon mi legis en faklibro de etiko: "*Se la kredantaj homoj timas pri tiu ĉi instinkto, se oni faras tiun ĉi forton kontraŭulo, tiam tiu ĉi forto sklavigos ilin.*"

Meritas multe pensadi pri tio. En la mezepoko pro iu erara penso la eklezio neatindite ordonis la celibaton al la pastroj. Historie eblas pruvi, ke tuj komenciĝis la bruligado de sorĉistinoj. Kaj hodiaŭ per la scienco de psikologio oni povas kunigi tiujn du fenomenojn. Celibato signifas, ke oni artefarite baris la seksan vivon de viroj — referencante pri Dio. Kompreneble okazas, ke homojn vere Dio vokas al celibata, sin-retira vivo, sed kiam oni oficiale kaj artefarite postulas, tio signifas: konstrui digon, barilon.

Kaj se oni konstruas digon, la seksa forto transformiĝas tiel, ke en ĉiuj virinoj oni vidas sorĉistinon, kiu logas, tentas kaj minacas savadon. Kaj ekfajris ŝtiparoj kaj oni mortigis milojn da kompatindaj virinoj. Pro tio, ke oni faris la instinkton kontraŭulo, la instinkto vere fariĝis kontraŭulo, detrua forto kaj sklavigis la homojn. Neniu havas tiom da problemoj pri sekso, ol kiu ĉiam volas batali kontraŭ ĝi. Tiu ne estas la deca, eklezia sinteno, ke ni estas bonaj homoj, kiuj bone scias, komprenas, faras kaj ĉe ni la malnovaj moraloj, dank'al Dio estas en ordo. Ekster nia rondo ĉio malboniĝas, ruiniĝas. Mi ne emas ĉi tiel pensadi, precipe pro tio ne, ĉar la eklezioj "produktas" multajn neŭrozajn pacientojn al la psikaj hospitaloj.

Tiel mia elirpunkto estas, ke la eklezio per pento, per amo, per fideleco al Dio, per atento kaj respekto pri la sciencaj rezultoj devas tuŝi tiun ĉi temon. La eklezio denove trapensu, atente tiujn vidpunktojn, honeste kaj homece priparolu, kion signifas la ordono: Ne adultu!

Se per tia animo ni komencas la novan parolon pri la demando, unue ni devas

klarigi, kion signifis tiu ĉi ordono en la mondo de la malnova testamento. La ordono ne ĝenerale parolas pri la homa seksa vivo, sed parolas konkrete pri la geedzeco, la familio. Se ni sufiĉe rigore vortumas la konturon de tiu ĉi ordono, ni devas diri, ke en ĝi ne estas malpermesoj pri la seksa vivo, sed estas defendo de la familio. Laŭ supraĵa pensado la du aĵoj (la seksa vivo kaj la familio) estas samaj. Sed tiuj du tute ne estas samaj, kaj precipe ne estis laŭ la hebrea pensado. Tie la baza situacio estis la mult-edzineco, kontraŭ kiu eĉ unu vorto ne estas en la Biblio, nur tion la Sankta Skribo pritraktas, kiujn rajtojn havas la diversaj edzinoj.

En la mondo de la malnova testamento — eĉ se tio estas doloriga — tiel ni devas kompreni la historie pruvitan enhavon de tiu ĉi ordono: Vi, juda viro, ne komencu seksan rilaton kun edzino aŭ fianĉino de alia juda viro. La ordono ne enhavas, ke kun sklavino, kun prostituino, kun ne juda virino, vi (juda viro) ne rajtas havi seksan rilaton. Pri tio tute ne parolis la leĝo. La judaj viroj multnombre eluzis tiun ĉi eblecon. Se ni profunde trapensas la historian situacion, tie ĉi tute ne estas la temo la ordigado de la seksa vivo, sed estas la temo la defendo de la geedziĝo. La esenco de la ordono estas, ke la pureco, la unueco, la naskemo de la elektita juda popolo restu sama. Se ni akre vortumas la sesan ordonon, Dio preskaŭ tion diras: "*Via seksa vivo estas via afero, sed la pureco, la multiĝo de la elektita popolo estas kulta afero, estas mia afero, tiun vi ne vundu!*"

Tio estas la fakto de la malnova testamento, kaj tion klare eksplikis la juna Martin Luther laŭ sia biblia esplorado.

Dio defendas la familion, la geedziĝon, la daŭrigon de la elektika popolo, kaj por ili Li donas ordonon. Ni saltu grande el la malnovtestamenta situacio, kion oni ne povas dementi, kaj ni alvenu al la moderna Freud-ismo. Kiel la instruo de Freud pensas pri la seksa vivo de homo?

Tion diras tiu moderna psikologia esplora skolo, ke la seksa instinkt-forto estas grandioza fonto de forto. Kiel la streĉigita risorto movas strukturon de la horloĝo, tiel la seksa instinkto movas la strukturon de la vivo. Tiel diras Freud: "*La tutan homan vivon, strukturon tiu grandioza forto-fluo direktas. Tiu ĉi forto-fluo gvidas la homojn al seksaj travivaĵoj, sed la socio faras malpermesojn.*"

Ne eblas tiel vivi la seksan vivon, kiel la homo ŝatus. Pro tio, parto de tiu ĉi forto devas iri al falsaj vojoj, kaj tiuj falsaj direktoj modifas ĝin. Ili aperas kiel kulturaj produktoj, kiel ambicio, kiel deziro al potenco, kiel bonfaroj, moralo aŭ simpatio, aŭ — laŭ Freud — kiel religiemo. Tiu praforto, kiu estas en la profundeco de la homa vivo, pro la sociaj baroj povas aperi kiel morala, religia produkto. La penso de Freud estis, ke tio estas la problemo, ke la socio faras tiom da reguloj kaj baroj en la vojo de la memfarado de la homo, ke la homo malsaniĝas pro tio, kaj tiel elformiĝas la diversaj nervsistemaj, animaj malsanoj.

Tion diras Freud: "*La vojo de la resaniĝo estas klara: oni devas trapaŝi tiujn sociajn barojn, kaj oni devas fari, kion la instinktoj igas fari.*" Ankaŭ hodiaŭ,

se iu iras al psikologo pro tiuj problemoj, la doktoro admonas al la paciento, ke vi ne havu digojn, vi faru, kion viaj instigoj diras, kaj vi estos sana.

Ni rememoru pri la situacio de la malnova testamento. Ankaŭ tie estis pli da seksaj energioj, ol kiom viro en geedziĝo povis uzi. Tiatempe estis legala institucio la "geedziĝo al unu nokto". La juda viro vojaĝis, edziĝis kun virino al unu nokto, matene skribis la tute regulan divorcleteron — ĉar la viro havis rajton kiam ajn divorci de sia edzino — kaj tiel la afero estis tute pura, kaj morale kaj jure kaj socie. Sed en tiu ĉi mondo eksonis la vorto de Biblio: Ne adultu! Vi ne rompu la geedzan rilaton, aman vivon de aliaj homoj. Ke vi iel alimeniere uzas vian plian seksan energion, pri tio ne parolas, ne faras regulon la malnovtestamenta leĝo. Paŝis kelkaj jarmiloj, kaj tiuj eblecoj, kiuj dum la tempo de la malnova testamento ekzistis, ili fariĝis neeblaj. Do kion eblas fari? Ĉar Freud pravas, kiam li diras, ke tiuj kadroj, inter kiuj la homoj vivas sian seksan vivon, ne sufiĉas eluzi ilian tutan seksan energion. Restas parto de energio, pro kio la homo suferas, per kiu oni devas fari ion. Kion oni faru per tiu restanta seksa energio — tio estas la granda demando.

Ni nun adaptiĝu en la religian pensmanieron. La religia pensmaniero diras, ke la tuta afero estas peko. Preskaŭ ankaŭ tio estas peko, kiam vi havas seksan vivon kun via edzino. Do vi faru la eblan plej minimuman seksan vivon. Tiu estas la vera sanktulo, kiu neniam tuŝas virinon, kaj trametas tiun energion al morala aŭ religia agado.

Tiu estas la religia penso. Metas la sigelon de la peko al la tuta afero, timigas la homojn, konstruas krampojn, timojn. Tion ne povas modifi, ke tiu ĉi forto estas en la homo, kaj fariĝas eksplodoj, malsanoj. Nek la freudismo estas solvo, uzi la instikton sen iu ajn baro, nek la kutima religia admono estas la solvo, ke vi bremsu, mortigu vian instinkton. Unu estas pli malbona solvo ol la alia.

Ĉu Jesuo Kristo diris ion pri tiu ĉi afero?



La adultino antaŭ Jesuo, El Greco ĉ. 1546

Jes, multon li diris. Sed ni devas honeste diri, ke la granda parto de tio, kion li diris, perdiĝis. Kaj ne nur hazarde perdiĝis, la disĉiploj "perdigis" tion. Estis tiel nova, tiel ŝoka, tiel alia, ol en tiuj kadroj en kiuj la disĉiploj kreskis, ke post la morto de Jesuo la disĉiploj retiris la malnovajn pensojn, kiujn Jesuo Kristo tute ne akceptis, kaj ili ne transdonis al ni la ideojn de Jesuo. Ili alojis (aŭ simple miksis) la malnovajn pensojn kun la penso de Jesuo. Kaj la vera, serioza biblia scienco havas tiun starpunkton, ke estas terure malfacile trovi, spuri, kion Jesuo vere diris pri la homa seksa vivo. Ĉar Li diris ion, ion ŝokigan, kion Liaj degnaj disĉiploj ne povis kredi kaj akcepti, kaj kiun ili ne transdonis plene al ni. Ŝoka estas, kiu okazis en tiu ĉi tereno. Nur unu historion mi citas. Oni kaptis adultan virinon, kaj la memfidaj farizeoj kunportis ŝin al Jesuo, ke oni mortigu per ŝtonoj ŝin. La praktiko estis tiatempe, ke viroj rajtis fari ĉion, kion ajn, sed se virino faris la samon, tiam ŝi kulpis kaj oni mortigis ŝin per ŝtonoj. Kion Jesuo respondis? "*La senpekulo elinter vi unua ĵetu ŝtonon sur ŝin.*"

Kaj malrapide, hontante la memfidaj farizeoj foriris.

La biblia-scienco tion diras, ke en tiu ĉi historio troviĝas, kion Jesuo pensis, sed estas ŝoka studo sekvi la vojon de tiu ĉi ununura biblia historio. Ĉar ankaŭ tiu ĉi historio preskaŭ perdiĝis inter la manoj de la disĉiploj. Nur vere malfruaj manuskriptoj gardis ĝin. Eblas senti, ke ŝokis la disĉiplojn la grandanimeco, la kompreno, kiel Jesuo vidis tiun ĉi virinon.

Biblia-scienculoj ĝenerale havas konvinkon, ke la rolo de Jesuo en tiu ĉi doloriga afero estas liberigi la virinojn el la despotismo kaj juĝado de la viroj. La virinoj vere rajtas esti tre dankemaj, ĉar tiun malnoblan tiranecon, kiun la viroj faris, Jesuo ne akceptis. Li ne akceptis la kutimon, ke viroj rajtas fari ĉion, kaj pro la sama agado oni mortigu la virinojn. La servo de Jesuo ne estis starigi novan kodekson, sed elpreni la virinojn el tiu ĉi nehumana situacio kaj doni al ili homan dignon. Ne estas hazardo, ke virinoj per tia mirakla adoremo, adorado rigardis Jesuon. Kaj ne estas hazardo, ke pro la vorto de Jesuo estis facile al Maria el Magdala forlasi, fini sian adultan vivon. Al tiu, kiu vere kiel homo pensis pri ili, virinoj obeis kaj komencis novan vivon.

Kion Jesuo diris pri sekso kaj adulto? "Unue vi serĉu la mondon de Dio kaj Lian verecon", kaj poste ĉiuj viaj problemoj solviĝos, inter aliaj ankaŭ la seksaj problemoj.

Per modernaj esprimoj dirite: la instinkta forto estas grandioza forto. Se homo estas sola, li/ŝi estas senpova kontraŭ tiu grandioza forto. Ne ekzistas homo, kiu estas sufiĉe forta batali kaj venki kontraŭ sia instinkto.

"Vi serĉu unue la mondon de Dio" signifas, ke unue vi engaĝigu vian vivon en pli grandan fort-reton. Se vi vivas vian vivon en la fort-reto de Dio, tiam bele, pure, humane ordiĝos ankaŭ via seksa vivo. Se iu havas iun aferon, belan pasion, mision, taskon, kiu ordigas sian energion en bonan direkton, kiu estas preta servi la aferon de Dio, tiu ne demonigas la seksan vivon. Kiu havas neniun aferon, al tiu homo la sekso estas ĉio.

La solvo ne estas, ke mi mem faras ion. Ni devas engaĝiĝi en la mondon de Dio, kaj tie ĉio ordiĝos.

Kiel ni komprenu la ordonon "Ne adultu" en la instruo de Jesuo?

1. Neŝanĝite valoras la origina signifo: Ne enrompu en la aman vivon de aliaj homoj, ne malbonigu la aman vivon de aliaj homoj.
2. Ne amegu la sekson. Ne pensu, ke tiu estas la maksimumo, tiu estas la plej-bono, kaj por tiu valoras ĉion transdoni. Ekzistas pli altnivelaj aferoj.
3. Ne timu pri la sekso. Ne timegu, ne subpremu, ne permesu, ke tiu ĉi forto demoniĝu. Ne forsendu, ne sufokigu, ĉar ĝi eksplodigos vian vivon.
4. Laŭ Jesuo Kristo la energio de sekso ne pro tio estas, ke estu vivo sur la tero, sed pro tio, ke pli homa estu la homo. Alimaniere dirite: La sekso ne pro tio estas, ke estu vivo sur la tero, sed pro tio, ke la vivo estu ĝojo sur la tero. Apostolo Paŭlo diras, ke la geedzeco parolas pri Kristo. Kaj se tio estas vera — kaj certe estas vera — tiam ankaŭ tio estas vera, ke la amo parolas pri la savado. Kie oni bele, en la ordo de Dio vivas, tie speguliĝas la savado.

Kie la seksa energio gajigas, donas ĝojon, pekliberigas, tie oni bone vivas per ĝi. Kie la ama vivo estas best-proksima, turmenta, perfortema, tie kaj tiam ankaŭ adulto troviĝas, eĉ se ili povas montri oficialan, eklezian pruvon pri geedziĝo. Tio estas mia fina difino.

*Dio helpu nin, ke ni bone*
*komprenu Lian penson.*

ꕥ

---

# Solenaĵo en Poděbrady

Koncizigis kaj tradukis Pavel Polnický, CZ

Post nelonga tempo okazis en Poděbrady denove grava festo. Antaŭ 70 jaroj estis en Poděbrady ordinitaj unuaj kvar virinoj kiel vikariinoj de Ĉeĥofrata evangelia eklezio. Inter ili estis Antonie Slámová, kiu poste servis en nia paroĥo. En baza lernejo ŝi instruis al mi religion.

La 21an de oktobro renkontiĝis pli ol 200 personoj kaj dum suna, varma vetero ĝuis riĉan programon. Diservo, rememoroj de kelkaj pastorinoj pri sia eklezia servo, scenmuntaĵo el historiaj dokumentoj tiurilataj kaj koncerto en nia paroĥeja ĝardeno. Komuna tagmanĝo kaj kafumado kun bonaj dolĉaĵoj ebligis nin debati kaj rememori.

Interesajn, kelkfoje nekredeblajn eĉ ridindajn arkivajn dokumentojn kunigis frato Adam Csukás, juristo de nia sinoda oficejo. El scenmuntaĵo verkita de frato Jan Beránek mi elektis nur kelkajn kaj tradukis ilin.

Problemaro de virina servo en eklezio rezonis jam pli frue, ol estis nia eklezio fondita. Reformita pastoro Fr. Kozák en sia libreto Marta: Ora libro por ĉeĥaj

knabinoj kaj patrinoj (1897) skribis. Destino de virino estas tute alia ol vira. Viroj devas fondi mastrumaĵon kaj ŝirmi ĝin. Laŭ ili portas familio nomon. Viroj prizorgas metiojn, entreprenojn kaj komercon, dediĉas al scienco kaj arto. Ili decidas pri leĝoj, gvidas ŝtaton kaj batalas kontraŭ malamikoj.

Nenion similan oni postulas de virinoj. Destino de virino estas en mastrumaĵo, en familia rondo. Taskoj de virinoj estas pli malgrandaj, sed des pli granda estas ilia honoro, se ili plenumas ĉion bone kaj bravece. Pri tia virino pravas biblia skribo: "Ŝia valoro estas pli granda ol perloj". Knabino bone edukita:

* klerigas sin per libroj,
* bone konas hejmlaborojn,
* estas purema,
* estu natureca en sia konduto,
* al ĉiu estu afabla.

La demando estas, kiel virino povus esti utila en eklezio. Kompreneble ŝi povus aktivi en kompatema ama servado. Ŝi povas prizorgi malriĉajn kaj malsanajn personojn, vidvinojn kaj orfojn, nesciantojn kaj devojiĝantojn. Tio estas ŝia laboro.

Pli repaciĝa situacio estis komence de la 20a jarcento. Korespondantoj de gazeto Hus en jaro 1910 skribis:



Pastorino A. Slámová el Trnávka dum vizito en Poděbrady, dekstre tiama loka pastorino M. Čejková kaj meze pastoro J. Beneš el Nymburk

* al multaj virinoj kontentige edziniĝintaj sufiĉas propra mastrumado kaj ĉiujn fortojn ili dediĉas al sia familio,
* inter ili estas tiaj, kiuj volonte aktivus publike. Iliajn vicojn pligrandiĝas inteligentaj knabinoj, kiuj eĉ havas memstaran postenon, sed ili restas senedzaj,
* mi vidus neniun katastrofon, se memstare pagantaj virinoj en paroĥejo, ricevu krom la aktiva ankaŭ pasivan balotan rajton. En ĉiu paroĥa konsilantaro povus esti kelkaj honorindaj virinoj,
* unu aŭ du piaj matronoj povus pliriĉigi eklezion.

Malgraŭ tiuj opinioj eklezia konsilio rigardas situacion singardeme kaj en sia raporto por la sinodo en la jaro 1913 rekomendas:

* eble estus utila por niaj komunumoj doni balotrajton al virinoj,
* necesas kalkuli kun la ebleco, ke tio povus ekigi pezan damaĝon por la bonfarto, respekto kaj trankvilo de multaj paroĥoj, eĉ povus ĝeni trankvilon inter virinoj kaj estiĝi fatala por la tuta landa eklezio,
* konsilio ne ignoras grandan virinan signifon por la vivo de eklezio kaj por ĝia estonteco, male aprezas multajn meritojn de multnombraj fratinoj,
* certe ni konsentas kun novaj eblecoj de virina edukado,
* sed tio ĉio ne permesas al ni akcepti balotrajton de virinoj en niaj paroĥejoj,
* tiun negativan starpunkton ni devas teni ĝis ni, laŭ spertoj de alilandaj eklezioj, estos certaj, ke balotrajto de virinoj ne signifos danĝeron por la eklezio,

* nur kiam ni havos tiun certecon, — ne estas klare kiam tio okazos — ĉiuj pripensemaj evangeliaj virinoj, kiuj sopiras pri la bonfarto de la eklezio, volonte partoprenos eklezian vivon kaj kontentos kun granda kaj belega aktivado, kiu estas malfermita por ili:
* atesti kristanan piecon en fidela korinklino al eklezio,
* prizorgi varmege sian komunumon,
* agi mizerikorde inter gefratoj, kiuj anime kaj korpe suferas, sciante, ke validas vorto de Sinjoro: "Rikolto estas granda, sed laboristoj malmultaj."

La debaton eniris per sia artikolo en gazeto Ĉeĥa reformacio fratino Pavla Moudrá, kies opinioj estas unusignifaj:
* kian postenon okupos virino en nia kunligita eklezio?
* kian progresan starpunkton volas havi nia evangeliana unio rilate partopreno de virinoj en ekleziaj funkcioj?
* ĉu inerte alteniĝi ordonon de s. Paulo, ke virinoj en eklezio silentu?
* Johano Hus kaj poste predikantoj Želivský kaj Rokycana kuraĝe forŝovis tiun ordonon kaj permesis al virinoj, publike defendi Dian veron kaj kontempli bibliajn tekstojn,
* virino, predikantino kaj diskonigantino de Diaj vortoj, vortoj de konsolo kaj mizerikordo — ĉu tio estas ia absurda fenomeno, ia eksceso de emancipado?
* ni hodiaŭ vidas virinon ĉie: postulas baloteblecon por esti deputito, prelegas en lernejoj, estas juĝistinoj, kuracistinoj, oficistinoj — ĉion tion virino kapablas fari, nur predikejo, loko kie ili plej bone povus realigi siajn talentojn, restos eterne fermita?
* eble tio estas mia iluzia sonĝo, kiu ĉe multaj viroj vekos indulgeman rideton, sed por mi estas aktiva agado de virino en kristana eklezio, ideala ebleco por evoluo de ĉiuj virinaj virtoj. Prediki Dian vorton, preĝi kun kredantoj, servi eŭkaristion, bapti novnaskitojn, ĝojigi la grave malsanajn, paroli pri entombigo kaj administri bone sian paroĥon. Kio el tio estas por virino ne taŭga, kion ŝi ne kapablos? Male, ĉio, tuta vivmaniero de anima mastrumanto, signas, ke estas taŭga por virino.

Ŝanĝon indikis kontribuaĵo de František Žilka en ĝenerala deputitaro en la jaro 1918. Krom alia li diris: "Mi ne kredas, ke la virino estas pli religia ol viro, sed certe ne estas malpli religia kaj estas klara, ke tie, kie temas pri kreado de plena vivo, sur fundamenta justeco, samaj rajtoj kaj frateco, tiam tie ne povas manki tuta duono de la homaro."


Preĝejo estis plena. Foto: J. Hofman

En la raporto de sinoda estraro por sinodo en la j. 1923 estas:

* en la teologia fakultato estas unu studentino,
* en eklezia regularo ne estas skribite, ĉu virino povas esti invitata al predika eklezia servo aŭ ne,
* sed la tradicio tion kontraŭas!
* pri tio sinodo povas decidi,
* ni pensas, ke al instruado de religio en lernejoj publikaj kaj en knabinaj mezlernejoj povas esti virino vokita.

Sinodo (1923) decidis jene: ni ne estas kontraŭ tio, ke studentinoj, kiuj havas maturecan ekzamenon kaj finstudis teologion, povas esti alvokitaj kiel katekistino en bazaj kaj mezaj lernejoj kaj al religia kaj sociala laboro eklezia. La propono de prof. Hrejsa, ke virinoj rajtas esti vikariinoj ne estis akceptita.

Tri fratinoj skribis peticion, subskribitan de kelkaj iliaj profesoroj, en kiu postulas permeson al spirituala laboro. Skribis: En estimo subskribitaj absolventinoj de teologio permesas al si doni al sinoda konsilio kaj al sinodo de Ĉeĥofrata evangeliana eklezio ĝentilan petskribon pri atribuo de samaj rajtoj, kiujn havas teologoj kiuj absolvis Husan fakultaton. Ili postulas pasivan balotrajton kaj rajton de ordinado kaj per tio aliron al spirituala ofico por tiuj, kiuj absolvis teologion kaj finis kun sukceso ambaŭ devigajn ekzamenojn. Ili pensas, ke per sia laboro en paroĥoj pruvis kapablecon por laboro en eklezio, same kiel iliaj kolegoj. Kaj pro tio ili postulas, ke eklezio decidu pri ilia elektoebleco esti vikariinoj kaj pastorinoj kaj por ilia ordinado. Ili estas konvinkitaj, ke kun la Dia helpo ni povas en tiu laboro sukcesi same kiel viroj kaj fari utilajn servojn al sia eklezio.

Al ordinado de virinoj sinodo en la j. 1932 esprimis tiel, ke: tiu demando estu donita por pripenso al konsilioj de unuopaj paroĥoj kaj al komisio elektita de sinodo.

Ordinado de virinoj fariĝis diskutata en tuta eklezio. Sinoda kuratoro František Kavka esprimis sin en gazeto Český bratr (Ĉeĥa frato) tre klare:

* ni ne povas en tiu afero ion ŝanĝi, same kiel ni ne povas transformi taskon de suno kaj taskon de luno,
* miljaroj cirkulas luno ĉirkaŭ la suno kaj akceptas lian lumon. La luno ne havas propran lumon, sed akceptas ĝin de suno. Suno akceptas lumon de Dio el lia volo kaj potenco,
* Dio ankaŭ decidis, ke dum la tago estos suno kaj nokte luno,
* ne estis kreita suno por luno, sed luno al helpo por suno. Se iam volus luno fortiri kaj iri per propra vojo sen suno, tiam eble povus ekbrili kiel suno, sed poste ie en nekonata loko pereos,
* edukiteco de virino estas reflektita lumo de vira edukiteco. Gvidanto restas viro, kvankam li kun virino kunlaboras en la scienco, arto kaj spiritaj aferoj,
* virina ordinado signifas descendi el nivelo eklezio de Dio al nivelo eklezio kultura. Kruco de Kristo estos malplenigita. Ne savis homaron virino, sed viro.

Opinioj de Kavka eksplodis vivan diskuton. Kuracistino A. S. Kavinová tiel respondas:

* estas diversaj taskoj kaj profesioj, sed por virinoj nur kelkaj? Kie prenas skribinto en Biblio rajton por du mezuriloj?
* mi estas certa, ke Dian spiriton oni ne povas limigi per malnovaj aŭ novaj regularoj,
* Dio estas viva kaj potenca, li ne estas sklavo nek de siaj planoj nek de niaj regularoj.

En la j. 1935 sinodo decidis jene: Teologie edukita kaj per ekzamenoj aprobita virino povas esti alvokita al servo por konkretaj ekleziaj laboroj. Se estos orde elektita kaj certigita, povas esti solene enoficigita.

Sinodo en la j. 1950 taskis al sia konsilia teologia fako, esplori tiun problemon kaj prepari raporton. En la fino de tiu dokumento, preparita de prof. J. B. Souček estas tio: Eklezio ne havas bibliajn kaj teologiajn gravajn argumentojn por rifuzi ordinadon al virinoj.

Tiuteman enketon, de sinoda konsilio, ricevis 247 komunumoj. Respondis jese 154, kontraŭ estis 54, 16 respondoj estis ne klaraj kaj 23 ne respondis. Jen kelkaj respondoj el diversaj komunumoj:

*Praha - Strašnice*:
* ni ne vidas saĝajn argumentojn por malpermesi al virinoj teologie edukitaj prediki, instrui religion kaj servi al eklezio. Sed ni ne povas konsenti kun tio, ke virino-pastorino gvidu memstare la komunumon,
* ni sentas, ke ŝi ne povus havi respekton, kiu estas por spirita paŝtisto necesa. Ni timas, ke pastorino povus esti por katolikoj kaj niaj inertspiritaj membroj tre indigna — kaj ho ve al tiu, per kiu indigno venas!

*Heršpice*:
* pli aĝaj membroj vidas ĉefan taskon kaj vivodevon de virino, eĉ teologie edukita, en familio. Ne eblas kaj ne estus etike postuli por virinoj celibaton.
* pastorino ne povus plenumi taskojn ekleziajn kaj familiajn.
* el tiuj praktikaj argumentoj ni ne povas konsenti kun ordinado de virinoj.

*Sázava*:
* ni konsentas kun ordinado de virinoj, sed ni proklamas, ke ni neniam elektus virinon kiel pastorinon.

*Vysoké Mýto*:
* nia respondo estas jesa,
* praktikaj problemoj, patriniĝo kaj hejmlaboroj, oni povas nuligi per tio, ke virinoj, kiuj volus memstare gvidi la paroĥon, restu ne edziniĝinta.

*Chleby*:

Ni proponas kompletan kuracistan esploron de ĉiuj kandidatoj kaj kandidatinoj de pastora ofico, kia estas postulata ekz. ĉe oficiroj kaj aviadistoj.

*Doksy*:

praktike ni opinias, ke en la kazo de atako de nia lando, tiuj niaj ordinitaj virinoj povus anstataŭi pastorojn, kiuj devus iri militservi.

**Sinodo en la jaro 1953 finfine decidis konfesi ordinadon al virinoj.**

# La Sankta Akvo

## Prelego dum kristana kongreso 2023

Grażyna Barszczewska-Banel, PL

Wasilków estas urbo kun 10 mil loĝantoj, apud Bjalistoko (naskiĝloko de L. L. Zamemhof, nordorienta parto de Pollando). Interesa/vizitinda ĝia parto estas sanktejo *Święta Woda*, esperantlingve Sankta Akvo.

Estas ĉi tie adorata Dipatrino Doloranta. Kulto de ĉi tiu loko datiĝas de la j. 1719 kaj ligiĝas kun la persono de Bazyli Papiernik el Supraśl, kiu perdis vidpovon. Reakiris ĝin dank' al akvo de ĉi loka fonteto. Kiel dankesprimo li fondis ĉi tie lignan kapelon kaj lokigis en ĝi bildon de Dipatrino Doloranta.


Verŝajne tio estis la unua kapelo en ĉi tiu loko. Dokumentoj atribuas al Bazyli la nomon Papiernik, kio signifas: paperfaranto. Li estis ligita kun Supraśl kaj grekokatolika monaĥejo de bazilanoj (laŭ Bazilo de Cezareo), en kiu funkciis granda, konata en Pollando presejo kaj paperfarejo. Li do verŝajne estis monhava kaj povis fondi kapelon. En tiu tempo metropolito kaj abato de la ordeno de bazilanoj estis Leono Kiszka. Oni do povas akcepti, ke konstruo de la kapelo okazis kun lia aprobo kaj ke li konsekris ĝin en la 10-a vendredo post Pasko en 1719.

Laŭ buŝaj kaj skribaj transdonoj oni povas akcepti, ke ĉi tiu terpeco kun la fonto estis konata por la loka loĝantaro multajn jarojn pli frue. Ĝi estis respektata kaj oni kredis je saniga forto de la akvo jam en mezepoko. Tamen nur en la komenco de la 18a jc., kiam oni konstruis la kapelon, la kulto de Sankta Akvo komenciĝis disvolviĝi kaj multnombraj mirakloj ligitaj kun reakiro de vidpovo de blinduloj famigis tiun lokon, komence en la ĉirkaŭaĵo kaj poste ankaŭ en aliaj partoj de Pollando.

El dokumentoj estas sciate, ke en 1740 la fonto estis barita kaj troviĝis ene de la kapelo. Ĉe la fonto loĝis ermito, kiu zorgis pri la loko.

La 25an de julio 1785 granda tempesto detruis la kapelon. Saviĝis nur muro kun la bildo de Dipatrino kaj la fonto. Oni taksis tion kiel miraklo. Verŝajne baldaŭ oni rekonstruis la kapelon de la ligno en la sama loko kun la fonto ene.

En 1795 Sankta Akvo, same kiel Wasilków, ektroviĝis en manoj de la prusaj okupintoj, kaj post 12 jaroj de la rusaj. Grekokatolika diocezo de Supraśl



Grażyna Barszczewska-Banel. Fotis Bengt Åradsson

estis enigita en Rusion. En la j. 1839 laŭ la decido de caro Nikolao I, greko-katolika paroĥo en Wasilków kune kun ĉiuj paroĥanoj fariĝis ortodoksa. Greko-katolikoj de Supraśl ne evitis persekutojn, tamen Sankta Akvo restis en iliaj manoj verŝajne ĝis la j. 1875.

Kiam ortodoksoj transprenis Sanktan Akvon, la kapelo estis en malbona stato. Tial oni malkonstruis ĝin kaj en la distanco de dekkelk metroj de ĝi oni konstruis novan, masonitan ortodoksan preĝejon en bizanca stilo, kun sonorilejo. Ĝi estis konsekrita la 14an de aprilo 1876. La konstrualaborojn faris devigitaj al tio loĝantoj de Wasilków. La ortodoksa preĝejo estis renovigata en la jaroj 1884-1890. Dum la laboroj oni akcentis ankoraŭ pli forte elementojn de la rusa arkitekturo. La 16an de junio 1889 la preĝejo estis konsekrita de la abato de la monaĥejo en Supraśl. En la j. 1900 oni komencis konstruon de barilo ĉirkaŭ la preĝejo.

En 1916 sub la germana premo la rusa armeo komencis retiriĝadi kaj kunprenadis amason da civila loĝantaro. Timego de la ortodoksa loĝantaro estis tiel granda, ke malpleniĝis preskaŭ tutaj vilaĝoj. Ortodoksaj preĝejoj restis malfermitaj, restis nek klerikaro nek kredantoj. Pro tio ili estis facila celo de rabado kaj detruado. Parton de la ekipaĵo de la preĝejo en Sankta Akvo, kune kun la bildo de Dipatrino, oni forportis enen de Rusio.

Post la reakiro de sendependeco de Pollando katolikoj pruvis la greko-katolikan devenon de la preĝejo kaj fakton, ke la mono por ĝia konstruo devenis de kontribucio (la loĝantoj estis devigataj doni monon por tiu celo) kaj la 30an de novembro 1921 la preĝejo en Sankta Akvo estis oficiale transdonita al katolikoj. La 26an de decembro la preĝejo estis solene konsekrita. Do komenciĝis la katolika periodo. Ne okazis iuj gravaj ŝanĝoj en la aspekto de tiu loko. La granda kapelo kun la elementoj de bizanca arkitekturo transdaŭris ĝis 1940. En la inventaro el 1936 subskribita de tiama paroĥestro p. Antoni Gajlewicz estas i.a. la informo, ke la kapelo havas kopion de la mirakla bildo de Dipatrino Doloranta. La kopio estis ankoraŭ dum la milito. Nun kopio de la bildo de Sankta Akvo troviĝas en la ortodoksa preĝejo en Wasilków. Ĉi tiu bildo estas pentrita sur tolo. Dorsflanke estas skribite en la rusa lingvo, ke la ikono estis farita la 7an de junio 1866. En tiu tempo ekzistis ankoraŭ originalo de la bildo, do la kopio verŝajne estas fidela respeguligo de la mirakla ikono de Dipatrino kaj probable ununura atestanto de ĝia vera aspekto. Post la perdo de la



Ĉe la Sankta Akvo. Fotis Bengt Åradsson

kopio, novan bildon, kiu nun troviĝas en la altaro de la preĝejo en Sankta Akvo, pentris Helena Rabczyńska , la patrino de la pastro Wacław Rabczyński, kiu komencis renovigon de ĉi tiu loko post la dua mondmilito. La bildo en la altaro ne estas kopio de la mirakla bildo, sed propra invencio de la pentristino.

Dum la dua mondmilito januare 1940 la kapelo estis detruita kaj profanita de sovetiaj soldatoj. Restis nur muroj. Ne estis pordo, fenestroj, planko kaj tegmento. En 1949 oni komencis konstruon de nova kapelo, kiu staras ĝis hodiaŭ. La konstrulaborojn gvidis pastro Wacław Rabczyński. Li plenumis funkcion de vera administranto de la paroĥo, ĉar la paroĥestro pastro Antoni Gajlewicz estis tre malsana. Post lia morto en 1951 p. Wacław Rabczyński. estis farita estro de la paroĥo en Wasilków. Tiam komenciĝis nova, grava periodo en la historio de Sankta Akvo. La nova kapelo estis konsekrita en 1950. Ĉar en tiu tempo ĉi loko estis la pilgrimloko, ekstere oni konstruis ambonon, de kiu oni diris predikojn dum diservoj okazantaj ekstere.

Post 1954 laŭ iniciato kaj projekto de p. W. Rabczyński estis konstruita groto, kiu per formo similis al la groto en Lourdes en Francio. La groton oni faris de granitaj ŝtonegoj, ene estis starigitaj figuroj de Dipatrino kaj de staranta surgenue s. Bernadetta Soubirous. Antaŭ la groto troviĝas kaviĝo limigita per balustrado, ŝtuparo gvidas al la fonto ĉirkaŭita per granita kadro.

Alia granda laboro de p. W. Rabczyński estis Kalvario. Ĝian konstruadon oni komencis ĉ. duono de 1955. La konstruado estis farita sekrete, sen sciigo de la urbaj kaj de la ekleziaj instancoj. Oni sukcesis konstrui sep altarojn de la Kruca Vojo sur montetoj ĉirkaŭ Sankta Akvo. Januare 1956 laŭ la ordono de komunismaj aŭtoritatoj la altarojn oni detruis. Saviĝis nur figuroj, kiuj troviĝis enkadre de Sankta Akvo kaj ene de la katolika tombejo.

Dum multaj jaroj aspekto de Sankta Akvo ne ŝanĝiĝadis. En 1997 ekestis ĉi tie paroĥo kaj estis iniciatita Monto de Krucoj. La paroĥestro estis farita p. Alfred Butwiłowski. De tiu tempo aspekto de la loko ĉiam ŝanĝiĝas. La kapelon iom oni pligrandigis kaj oni transformis en paroĥan preĝejon. De la orienta flanko estas aranĝita ankaŭ ekstera altaro.La interno de la preĝejo estas unuspaca, estas kovrita per ligna volbo. La ĉefa altaro enhavas menciitan bildon de Dipatrino Doloranta pentritan de H. Rabczyńska (alia bildo de la sama artistino, Pietato, troviĝas sur la maldekstra muro super la pordo. Ambaŭ bildoj estis pentritaj post la j. 1947). De la malnova ekipaĵo de la loko restis kapeletoj prezentantaj kvin Misterojn Dolorajn de Rozario, kiuj troviĝas ĉirkaŭ la preĝejo, antaŭ la groto estas la ambono kaj akvujo Betsaida kun la figuro de anĝelo. De la iama barilo restis nur pordegoj.

En la j. 1778 la Sankta Seĝo donis privilegion festi indulgencon honore al Dipatrino Doloranta. En 1815 oni donis pluan indulgencon. Hodiaŭ ili estas festataj dufoje jare: en junio la 10an dimanĉon post Pasko, kaj septembre en la tago de Dipatrino Doloranta.

# Nia sekvontjara kongresurbeto: Vác

Vác kuŝas en la koro de la Danuba kurbo, sur la maldekstra bordo de Danubo, kaj retrorigardas al historio de preskaŭ mil jaroj. Ĉu vi imagis, ke ekzistas multaj legendoj ligitaj al la historio de la urbo? Ĉu vi sciis, ke dank' al la pasintaj jarcentoj, Vác fariĝis unu el la plej ekscitaj urboj ĉe la Danuba Kurbo?




Vác estas unu el la plej malnovaj loĝataj setlejoj en nia lando, sankta kaj sekulara vivo interplektiĝis tra la jarcentoj, kaj tiel formiĝis la bildo de la urbo, kiu ankoraŭ hodiaŭ videblas. La grandurbo havas sian nomon de ermito nomita Wach kaj reĝo Géza I (945–997). Gravas scii, ke Vác estas la urbo, kee Géza estis entombigita meze de la baziliko en 1077. La katedralo estis signife rekonstruita plurajn fojojn en postaj jarcentoj, sed la tombo de la fonda reĝo ĉiam estis respektata. Sur la bordoj de Danubo, sur la kastelmuro, estas statuo de reĝo Géza.

En la Mezepoko, la urbo estis ĉirkaŭita de ŝtonmuro, unu el ĝiaj angulaj bastionoj estas la *Hegyes* (pika) *Turo*, kiu ankoraŭ estas videbla. Krome, vi ankaŭ povas renkonti la iaman *Vienan Pordegon* kaj la *Hatvanian Pordegon* dum promenado en la bela urbo. Reĝo Matiaso (1143–1490) ankaŭ ŝatis resti en la urbo, kaj Vác havis sian oran epokon en tiu tempo. La urbo estis unu el la plej gravaj arkitekturaj, artaj, sciencaj kaj sociaj renesancaj centroj de la epoko.

La turkaj tempoj alportis multajn mal-






facilaĵojn. Kiam ili foriris, la urbo estis preskaŭ tute detruita. La kastelo Vác estis komplete detruita en 1684. Post tio, fajroj kaj epidemioj ankaŭ malpliigis la loĝantaron. La publikaj statuoj plejparte prezentas patronsanktulojn, kiujn la loĝantaro de la urbo starigis pro dankemo por venki malfacilajn tempojn.




Pli postaj epokoj kaj la konstruantaj episkopoj de Vác alportis leviĝon al grand-urbo, kiu estis preskaŭ renovigita por la vizito en 1764 de Mária Theresia (1717–1780). La konstruaĵoj en la ĉefplaco estis plibeligitaj, la preĝejo de Sankta Mikaelo staranta ĉi tie estis malkonstruita, kaj ĝiaj ŝtonoj estis uzataj por la Katedralo, kiu daŭre staras hodiaŭ. La Episkopa Palaco, ankoraŭ videbla hodiaŭ, estis konstruata kontraŭ ĝi. Triumfa arko estis starigita en honoro de Mária Theresia.

La Danuba bordo gravegis el komerca kaj ekonomia vidpunkto, sed la akvorando ankaŭ estis populare uzata por malstreĉiĝo. Ankaŭ Mária Terézia mem ŝatis promeni ĉi tie, kaj la promenejo longe konservis ŝian nomon. La urbo poste spertis plurajn sieĝojn,




la memoron pri la batalo de aprilo 1849 konservas la ponto *Kőszentes* (signifas ŝton-sanktula).

Nuntempe, promenante sur la stratoj de la urbo, la konstruaĵoj rakontas al ni pri la bunta historio de Vác. Promenante inter la lasitaj memoroj al ni, vi certe tuj sentos vin hejme en la urbo, kiu estas ankaŭ grava dioceza centro kaj legenda lerneja urbo.

Poŝtkartoj: el la kolekto de Péter Cservenák

Ne forgesu aliĝi al la kongreso!
Aliĝilo en la antaŭa numero – Dia Regno 5/2023.
Facebook: kongreso kristana

# Informetoj

## GRAVA ATENTIGO!

En la 5a numero de Dia Regno estis peto plenigi aldonitan demandilon. Ĝis la komenco de decembro mi ricevis nur 10 demandilojn! Do estu tiel afablaj kaj rapide sendu demandilon al mi. Se mi ne ricevos de iu demandilon, mi opinios, ke tiu frato/ fratino jam ne volas ricevadi nian gazeton aŭ mortis.

Sekretario
*Pavel Polnický*

**Ne forgesu pagi la membrokotizon por 2024 !**

## Kevin E. Bourne

### 1956–2023

Kevin E. Bourne, nia iama membro, naskiĝis en Reigate, Anglio, en 1956. Liaj ĉefaj interesoj estis kristanismo, muziko kaj lingvoj. Kolegie li studis rusajn lingvon kaj literaturon kaj sekvis la ritojn de la ortodoksa eklezio rusa, krom la anglikana.

Lerninte Esperanton, mi unue renkontis lin ĉe esperanto-diservo londona je kristnasko 1983. Poste li aktivis en esperanta kristana movado kaj partoprenis la KELI-kongreson ĉe Annan Court en 1989. Li ankaŭ kontribuis al nia ekumena himnaro Adoru.

Post la ĉeso de la esperanto-diservo londona, mi ne plu renkontiĝis kun Kevin, sed ni poste korespondis iomete. Frue en 2020 Kevin subite malsaniĝis kaj tio pli-malpli senpovigis lin kaj li mortis hospice en Redhill la 30an de julio, fervora kristano ĝis la fino.

La funebran solenaĵon (plenplena) mi ĉeestis ĉe anglikana preĝejo en Salfords, la 4an de septembro. Kevin postlasis ekzinon Jane, du filinojn kaj 4 genepojn.

Dio ripozigu lian karan animon.

*Sincere de Martyn H. McClelland*

# Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno – Kotizoj 2024

| | |
|---|---|
| Individua membro (kun Dia Regno) | 20,00 EUR |
| Familia membro (sen DR) | 2,00 EUR |
| Subtenanta membro (kun DR) | 30,00 EUR |
| Dumviva membro (20-obla jarkotizo) | 400,00 EUR |
| Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI, | 16,00 EUR |
| pagante tra libroservo | 18,00 EUR |
| IKUE-anoj rajtas aboni Dia Regno-n, turnu vin al la kasisto de KELI | 10,00 EUR |
| Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj | 2,00 EUR |
| Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n) | Donaco |

Pagmanieroj (se ne estas aparte indikita sube):

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtĝire al **UEA,** Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
   - konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
   - konto-numero en Svedio 74374-0
   - konto-numero en Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio,** Rotterdam, menciu: por KELI-konto **kelk-p:** BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
   Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
   ✆ +36 302 000 306; 💻 agnes<ĉe>raczkevy-eotvos.com

Notu: Ŝanĝu <ĉe> al @

**Ĉeĥa Respubliko** 450 CZK
Peranto: Pavel Polnický,
Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
✆ +420 723 672 335,
💻 polnickypavel<ĉe>seznam.cz

**Francio** 25 EUR
CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
"Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL)". Kasisto: Samuel Gaillard,
5 rue Maurice Ravel,
FR-63800 Cournon d'Auvergne
✆ +33 (0)4 73 84 31 31,
💻 samuel.gaillard<ĉe>ac-clermont.fr

**Germanio** 25 EUR
Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V.
Banko: Evangelische Bank EG Kassel, Kiel
IBAN: DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC: GENODEF1EK1
Kasisto: d-ro Rudolf Fischer,
Gustav-Adolf-Str. 2a,
D-48356 Nordwalde,
✆ 0049 2573 / 626,
💻 fischru<ĉe>uni-muenster.de

**Usono** 30 USD
Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al la peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
💻 jeraldveit<ĉe>yahoo.com

# Laŭdon – Laudato si




LAUDATO SI' • M: anonima el Italujo • M-versio kaj E (laŭ la Suno-Himno de Francisko el Asizo): Albrecht Kronenberger 2020-09-30, por la Virtuala Sabata IKUE-Kunveno je la 3a de oktobro • kp. ADORU 005.17